Anche per l'IFEA è stato preparato uno statuto, il quale, appena ci saranno le condizioni, sostituirà l'esistente.
Dal 15 al 28 maggio c'è stato il congresso e post-congresso IFEF a Kunming (CN); dall'Italia eravamo in 8, con i coniugi Madella, la figlia e due nipoti di Luigia.
Esperienza meritevole. Ottima organizzazione dei cinesi, su cui trovate specifico rapporto.
Dopo la Cina sono seguiti contatti fra 30 studenti che studiano il cinese in un liceo di Bologna e altrettanti ragazzi cinesi del Collegio Artistico in cui studiano anche Esperanto con Alessandra Madella.
In giugno a Parma si sono svolti gli esami di 1° e 2° grado per 7 persone, esaminati da Romano, Luisa e Gustavo.
Purtroppo nessuno da Bologna, sebbene al nostro corso presso il DLF parteciparono, saltuariamente, 5 allievi.
In luglio abbiamo iniziato una collaborazione con un imprenditore del settore imballaggio che aspira a diffondere l'Esperanto tramite la sua attività industriale. Intanto si procede alla traduzione di dati tecnici per la stesura di un apposito "terminaro" di settore.
Tali contatti hanno favorito le premesse per alcune conferenze di Romano nel Comune di Monghidoro.
In ottobre, dal 15 al 20, ho partecipato all'*estrarkunsido* a Veliko Tarnovo (BG).
Temi principali: i soliti organizzativi e il congresso di Varna, ove sembra anche possibile organizzare spettacoli d'arte degli allievi del Collegio d'arte cinese di Kunming. I ragazzi artisti che parteciperanno saranno scelti soprattutto tra gli studenti di Esperanto.
Le difficoltà non mancano, ma la nostra attività prosegue con la lena che ci permettono le circostanze. □ *ViTo*

CHI PER PRIMO … ?
KIU UNUE …. ?

Scartamento di larghezza standard

Lo scartamento di larghezza standardizzata, circa 1,5 m, fu adottato per la prima volta nell'Impero Romano.
Nell'antica Cina esistevano delle rotaie di pietra che si conformavano a standard locali, finché durante la Dinastia *Chin* (221-206 a.C.) *Shir Huarng Di,* il primo imperatore della Cina, decise saggiamente di far adottare uno scartamento con uguale ampiezza in tutto il paese e nei territori vicini sotto il suo dominio.
In questo modo i trasporti nazionali furono grandemente agevolati e da allora in Cina c'è sempre stato uno scartamento di larghezza *standard*.
Una sola provincia mantenne uno scartamento più ampio, ai cui confini c'erano delle stazioni di cambio degli assali che permettevano ai vagoni di proseguire.

Normala ŝpuro

La normala ŝpuro, ĉirkaŭ 1,5 m, estis adoptita por la unua fojo en la Romia Imperio.
En la antikva Ĉinio ekzistis ŝtonaj reloj, kiuj adaptiĝis al lokaj normoj, ĝis dum la Dinastio *Chin* (221-206 a.K.) *Shir Huarng Di*, la unua imperiestro de Ĉinio, saĝe decidis adopti standardan ŝpuran larĝon en la tuta lando kaj en la najbaraj teritorioj sub sia regado.
Tiel la naciaj transportoj estis treege plibonigitaj kaj de tiam en Ĉinio ekzistis normala ŝpuro.
Nur unu provinco konservis ŝpuron iom pli larĝa kaj ĉe la limoj estis stacioj kie okazis radaksaj ŝanĝoj, per kiuj la vagonoj povis plu veturi. □

Locomotiva

La prima locomotiva a vapore fu costruita dall'ingegnere inglese Richard Trevithick (1771-1833) per un breve tratto di ferrovia a Coalbrookdale, nella Inghilterra centrale.
Non si sa molto di quell'impresa, ma l'anno successivo Trevithick costruì un altro motore.
Nel febbraio del 1804 quella locomotiva fece con successo un viaggio di 14 km a 8 km all'ora alla testa di un treno che trasportava 10 t di ferro.
I motori erano troppo pesanti per i primitivi binari di quel tempo.
Il modello di Trevithck aveva una trasmissione a volano poco efficiente, ma per certi aspetti era più sofisticato di modelli successivi: la caldaia aveva una distribuzione razionale del calore con un fumaiolo a ferro di cavallo e le ruote erano lisce, anziché dentate.

Lokomotivo

La unua vaporlokomotivo estis konstruita fare de la angla inĝeniero Richard Trevithick (1771-1833) por mallonga fervoja linio en Coalbrookdale, en centra Anglio.
Ne multe oni scias pri tiu evento, sed la sekvan jaron Trevithick konstruis alian motoron.
En februaro 1804 tiu lokomotivo faris sukcesan vojaĝon laŭ 14 km je 8 km/hore, ĉe la kapo de trajno portanta 10 tunojn da fero.
La motoroj estis tro pezaj por la tiamaj primitivaj trakoj.
La modelo de Trevithck havis transmision kun inercirado ne tro funkcianta, sed je iuj aspektoj ĝi estis pli rafinita ol postsekvaj modeloj: la kaldrono havis racian distribusistemon de la varmego kun kamentubo en formo de huffero kaj la radoj estis glataj, anstataŭ dentaj. □

A n e k d o t o j

Nikolaj Vasilievič Gogol
(1809 - 1852)

Il famoso romanziere russo una volta era seriamente ammalato. Quando il suo stato poco a poco migliorò gli si permise di ricevere visite e un suo amico gli chiese: - Ora sei già fuori pericolo, non è vero?



Gogol, ancora a letto, gemette: - No.

- Da cosa lo deduci? Chiese l'amico.

- Soltanto da questo, mio caro… Ed è male. Il pericolo è incombente. Il medico vuole ancora venire a visitarmi.

Nikolaj Vasilievič Gogol

La fama rusa romanverkisto iam estis serioze malsana. Kiam lia stato jam pliboniĝis tiagrade, ke oni permesis al li akcepti vizitojn, unu el liaj amikoj demandis: - Nun vi jam estas, mi esperas, ekster danĝero, ĉu ne?

Gogol, en la lito, nur ekgemis: - Ne.

- El kio vi supozas tion? - demandis la amiko.

- Nur de tio, mia kara ... Estas malbone. La danĝero damne minacas. La kuracisto volas ankoraŭfoje veni viziti min.

Maksim Gorkij
(1868 - 1936)

Durante un viaggio nella Russia zarista il famoso scrittore fu arrestato e imprigionato.

Il commissario di polizia non voleva credere che egli fosse il grande scrittore. Alla fine gli disse: - Potremo convincerci. Se voi siete veramente Massimo Gorkij, sarete capace di scrivere un racconto o un episodio prima di domattina. Se lo farete io vi libererò. La mattina dopo Gorkij consegnò un racconto al commissario e fu libero. Dopo qualche giorno egli lesse il suo racconto in una rivista locale. Come autore c'era la firma del commissario.

Maksim Gorkij

Dum sia vagado tra la cara Rusio la fama verkisto estis arestita kaj enkarcerigita.

La polica komisaro neniel volis kredi, ke li estis parolanta kun la granda verkisto. Fine li diris: - Finfine, ja ni povas konvinkiĝi. Se vi fakte estas Maksim Gorkij, vi certe kapablos ĝis la sekva mateno verki iun rakonton aŭ epizodon. Se vi tion faros, mi liberigos vin.

La sekvan matenon Gorkij transdonis al la komisaro rakonton kaj estis libera. Post kelkaj tagoj li legis sian rakonton aperigita en loka gazeto. Kiel aŭtoro estis subskribinta la komisaro.

Glen Herbert Gould
(1932 -1982)

Il grande pianista canadese, scapolo e misantropo, lasciò per testamento metà del suo rilevante patrimonio alla S.P.C.A. (una società dedita alla prevenzione della crudeltà verso gli animali), e l'altra metà all'Esercito della Salvezza.

Glen Gould

La granda kanada pianisto, fraŭlo kaj misantropo, testamentis la duonon de siaj havaĵoj favore al S.P.C.A. (organizo kiu protektas la animalojn) kaj la alian duonon al la Savarmeo.

Sacha Guitry

(1885 - 1957)

Un giovane giornalista che lo intervistava gli disse: - Ho molta ammirazione per lei.



Guitry gli rispose: - Anch'io!

Sacha Guitry

Juna ĵurnalisto, kiu intervjuis lin diris: - Mi multe admiras vin.

Guitry respondis lin: - Ankaŭ mi!

Edmund Gwenn

(1877 - 1959)



L'attore americano si stava spegnendo in ospedale. Il regista John Ford gli chiese: - Come va?

Egli rispose: - Morire è facile; è molto più difficile far ridere il pubblico.

Edmund Gwenn

La usona aktoro estingiĝis en hospitalo.

La filmreĝisoro John Ford demandis lin:

- Kiel vi fartas?

Li respondis: - Morti estas facile; multe pli malfacile estas ridigi la publikon.

Heinrich Heine

(1797 - 1856)

Una volta il poeta tedesco fece un duello con la pistola.



Egli sparò per primo, ma non colpì. Poi sparò l'avversario.

Il colpo era diretto al cuore di Heine, ma esso fu fermato dal portafogli che teneva sul petto ed egli rimase illeso.

Con calma tirò fuori il portafogli che aveva fermato il proiettile e disse: - Questo sì che è denaro ben investito!

Heinrich Heine

Iam la germana poeto havis duelon per pistoloj.

Li elpafis la unua, sed ne trafis. Poste pafis la kontraŭlo.

La kuglo estis direktita rekte en la koron de Heine, sed ĝi estis haltigita de lia surbrusta monbiletujo kaj li restis nevundita.

Li trankvile eltiris la monbiletujon, kiu haltigis la kuglon, kaj diris: - Tion mi povas nomi bone deponita mono!

Ernest Hemingway

(1899 - 1951)

Durante un'epidemia di forte influenza negli Stati Uniti un editore chiese allo scrittore: - Maestro, come vi difendete dall'influenza?



Hemingway sorrise: - Bene, bevo due volte al giorno un doppio wisky.

L'editore si rabbuiò: - Ma, maestro, questo non basta …

- Lo so, rispose Hemingway, ma di più non lo reggo …

Ernest Hemingway

Dum epidemio de forta gripo en Usono iu eldonisto demandis al la verkisto: - Majstro, kiel vi defendas vin kontraŭ la gripo?

Hemingway ekridetis: - Nu, mi prenas dufoje tage duoblan porcion da viskio.

La eldonisto malsereniĝis: - Sed, majstro, ja tio ne sufiĉas ...

- Mi scias, - respondis Hemingway, - sed pli multe mi ne toleras …

Ernest Hemingway
(1899 - 1951)

Un amico del Premio Nobel americano, che conosceva la natura vagabonda dello scrittore, una volta gli indirizzò così una lettera: “Allo scrittore Ernest Hemingway, Dio sa dove.”
La lettera, ancorché così indirizzata, raggiunse lo scrittore.
Dopo qualche giorno l’amico ricevette da Hemingway un telegramma: “Dio lo sa. Ernest”

Ernest Hemingway

Iu amiko de la Nobelpremiita usona aŭtoro, kiu konis la maltrankvilan, ĉiam migreman naturon de la verkisto, foje ĉi tiel adresis al li leteron: "Al verkisto Ernest Hemingway, Dio scias kie."
La letero, eĉ tiel adresita, alvenis al la verkisto.
Post kelkaj tagoj la amiko ricevis de Hemingway telegramon: "Dio scias. Ernest"

Helenio Herrera
(1910 - 1997)

Un tifoso della squadra di calcio AC Milan diede a un suo asinello appena nato il nome Herrera, glorioso allenatore della rivale squadra locale Internazionale.



Ma Herrera valutò la cosa offensiva come un’idea spiritosa e disse a un giornalista: - Già da ragazzo ammiravo gli asini.
Sanno sopportare, sono saggi, ostinati, perseveranti e hanno senso umoristico.
Queste sono le qualità che deve avere ogni allenatore.
Grazie per l’onorificenza.

Helenio Herrera

Iu favoranto de la piedpilka teamo AC Milano donis al sia novenaskita azenido la nomon Herrera, laŭ la glora futbaltrejnisto de la loka rivala klubo Internazionale.
Sed Herrera konsideris tiun ĉi ofendan aferon bona ŝercideo kaj al iu ĵurnalisto li diris: - Jam kiel knabo mi admiris azenojn.
Ili estas eltenkapablaj, saĝaj, obstinaj, celkosciaj kaj havas sencon por humuro.
Tiuj estas la kvalitoj, kiujn devus havi ĉiu trejnisto.
Dankon pro la distingo!

Victor Hugo
(1802 - 1885)

Durante un suo viaggio in Prussia, un doganiere chiese al famoso autore francese quale fosse la sua occupazione.
- Scrivo.
- Ma io vi domando, come vi mantenete.
- Con la penna.
Il doganiere annotò sul suo documento: “Victor Hugo, commerciante di penne.”

Victor Hugo

Dum vojaĝo al Prusio doganisto demandis al la fama franca aŭtoro, kia estas lia okupo.



- Mi skribas.
- Sed mi demandas, per kio vi vivtenas vin.
- Per plumo.
La doganisto notis en sian paperon: "Victor Hugo, plumkomercisto." □

R i m a ĵ o j

RIMEDIO

Un lupo disse a Giove: - Quarche pecora
dice ch'io rubbo troppo... Ce vo' un freno
per impedì che inventino 'ste chiacchiere... -
E Giove je rispose: - Rubba meno -.

SOLVO

Lupo al Jupitero diris: - Iu ŝafo
diras, ke mi tro ŝtelas... Necesas bremso
kontraŭ la inventado de tiuj klaĉoj... -
Jupiter' respondis: - Malplimulte ŝtelu -.

ALL'OMBRA

Mentre me leggo er solito giornale
spaparacchiato all'ombra d'un pajaro
vedo un porco e je dico: - Addio, majale!
vedo un ciuccio e je dico: - Addio, somaro!

Forse 'ste bestie nun me capiranno,
ma provo armeno la soddisfazzione
de potè di' le cose come stanno
senza paura de finì in priggione.

EN LA OMBRO

Dum mi legas la kutiman ĵurnalon
sterne kuŝanta ĉe pajlostakaro
vidante porkon: - Porko! mi ĝin aldiras
vidante azenon respektive mi alsalutas!

Eble tiuj bestoj ne povas kompreni,
sed mi sentas la plenĝuan kontenton
plendiri verojn, tiel kiel ili estas
sen timi, ke oni enmetos min prizonen.

LA SPECCULAZIONE DELLE PAROLE

Una Gallina disse a un Gatto nero:
- So' tre giorni che cerco mi' marito...
Chissà com'è finito!
Pe' di' la verità ce sto in pensiero...
Er Gatto corse subbito in cucina,
e, ner sentì ch'er pollo era già stato
bello che cucinato,
ritornò addietro e disse a la Gallina:
- Vostro marito passerà a la Storia:
perché fece una morte propio bella,
arabbiato in padella,
framezzo ar pomidoro de la gloria!
l'hanno tirato er collo, questo è vero,
ma lui rimane sempre tale e quale
un martire der Libbero Pensiero
che se sacrificò per l'Ideale ...
Anzi, lo stesso coco
che l'ha tenuto ar foco, m'ha ridetto
che, fra l'antre onoranze, tra un par d'ore
sarà commemorato in un banchetto
con un discorso de l'Ambasciatore...
Io stesso, come Gatto, penserò
a sistemaje l'ossa... -
La vedova, commossa, ringraziò…

VORTSPEKULADO

Kokino alparolis nigran Katon:
- De tri tagoj mi serĉas mian edzon ...
Kiu scias, kiel li finiĝis!
Verdire mi sentas grandan angoron ...
La Kato tuj alkuris kuirejen,
kaj, sciante, ke koko jam finkuiriĝis,
venis returnen dirante al la kokino:
- Via edzo eniros la historion:
ĉar li havis la plej belan morton,
diablemaniere rostita en kaserolo,
meze de tomatoj plenglore!
Oni tordis, verdire, al li la kolon,
tamen li restos same por ĉiame
martir' de la Libera Pensmaniero
ĉar li por la Idealo sin oferis...
Fakte, eĉ la sama kuiristo,
kiu rostigis lin, substreke diris, ke
kun grandaj honoroj, post du horoj,
en bankedo, solene lin oni festos,
per parolado de la Ambasadoro ...
Mi mem, kiel Kato, klopodos zorgi

por finaranĝi lian ostaron ... -
La vidvino, kortuŝita, multe dankis …



Sed mi vin avertas, ke sur mia trunko
estas branĉo nepre memorenda
al la bono de Dio kaj de la homaro.
Ĉar tiu branĉo, simpla kaj modesta,
estis forta kaj sindona kaj pruvis tion
en la tago en kiu ĝi eltenis honestulon
kiam, el ĝi, li sin pendigis.

ER TESTAMENTO D'UN ARBERO

Un Arbero d'un bosco
chiamò l'ucelli e fece testamento:
- Lascio li fiori ar mare,
lascio le foje ar vento,
li frutti ar sole e poi
tutti li semi a voi.
A voi, poveri ucelli,
perché me cantavate le canzone
ne la bella staggione.
E vojo che li stecchi,
quanno saranno secchi,
fàccino er foco pe' li poverelli.
Però v'avviso che sur tronco mio
c'è un ramo che dev'esse ricordato
a la bontà dell'ommini e de Dio.
Perché quer ramo, semprice e modesto,
fu forte e generoso: e lo provò
er giorno che sostenne un omo onesto
quanno ce s'impiccò.

TESTAMENTO DE ARBO

Arbo de iu arbaro
vokis la birdojn deklarante testamente:
- Mi lasas miajn florojn al la maro,
mi lasas la foliojn al la vento,
la fruktojn al la suno kaj poste
ĉiujn semojn al vi.
Al vi, malriĉegaj birdetoj,
ĉar vi kantis al mi la kanzonojn
dum la belaj sezonoj.
Kaj mi volas, ke la branĉetaro,
post sekiĝo, varmigu
per fajro malriĉulojn.

MATINA ABBONORA

Doppo una notte movimentatella
ritorno a casa che s'è fatto giorno.
Già s'apreno le chiese; l'aria odora
de matina abbonora e scampanella.
Sbadijo e fumo: ciò l'idee confuse
e la bocca più amara de l'assenzio.
Casco dar sonno. Le persiane chiuse
coll'occhi bassi guardeno in silenzio.
Solo m'ariva, da lontano assai,
er ritornello d'una cantilena
de quela voce che nun scordo mai:
- Ritorna presto, sai?
Sennò me pijo pena...

E vedo una vecchietta
che sospira e m'aspetta.

MATENE FRUE

Post nokto tre aventuroplena
mi revenas hejmen ĉe tagiĝo.
Jam malfermiĝas preĝejoj; la aero
odoras je fruo kaj jam ektintiĝas.
Mi oscedas kaj fumas: menskonfuzita
kun la buŝo pli amara ol absinto.
Mi endormiĝas. La fermitaj latŝutroj
per okuloj suben rigardas en silento.
Nur alvenas al mi, de malproksime,
la refreno de kantileno
de tiu voĉo, kiun mi neniam forgesas:
- Revenu baldaŭ, ve! ja vi ne scias?
Alie mi ekafliktiĝas ...

Kaj mi vidas maljunulineton,
kiu plusopirante min atendas. □

(Verkoj de Trilussa, Trad. RoBo)

D i v e r s a ĵ o j

Il regista americano *Alfred Hitchcock* usava apparire fugacemente in tutti i film da lui diretti.
Quando girò "*Lifeboat*" (1944), una storia che dall'inizio alla fine si svolge su una barca, sorse il problema di come giustificare la sua presenza.
"Hitch" lo risolse così: uno degli attori, *William Bendix*, trova un vecchio giornale sulla barca.
Lo apre, e nel mezzo c'è la pubblicità di un prodotto dimagrante con la foto di un grassone.
Il grassone era proprio lui, Hitchcock.

La usona filmreĝisoro *Alfred Hitchcock* kutimis aperi momente en ĉiuj siaj filmoj.
Dum la filmado de "*Savboato*" (1944), rakonto, kiu de komenco al fino okazas sur ŝalupo, ekestis la problemo kiel pravigi lian ĉeeston.
"Hitch" solvis ĝin tiamaniere: unu el la aktoroj, *William Bendix*, trovas malnovan ĵurnalon sur la boato.
Li malfermas ĝin, kaj en la mezo estas reklamo pri produkto por maldikiĝi kun portreto de dikulo.
La dikulo estis ĝuste li, Hitchcock.

Un bianco americano prepara legna da ardere per l'inverno.
Chiede a un indiano suo vicino se il prossimo sarà un inverno freddo. Il vicino risponde; - Un po'.
Così il bianco continua a spaccare legna. In seguito ripete la stessa domanda all'indiano che risponde: - Sì, sarà abbastanza rigido.
Il bianco continua a segare, spaccare, segare e spaccare legna.
Alla domanda posta la terza volta il vicino risponde: Sarà un inverno freddissimo.
Allora il primo gli chiede: - Da quali segni riesci a capire come sarà l'inverno?
E lui: - Oh, è semplice, ho notato l'enorme catasta di legna ammassata nel tuo cortile!

Usona blankulo preparas brullignon por la venonta vintro.
Li demandas al sia indiana najbaro, ĉu laŭ li la jam proksima vintro severos.
La najbaro respondas: - Iom.
Do la blankulo plu hakas lignon. Denove li starigas la saman demandon al la indiano, kiu respondas: - Jes, sufiĉe severa.
La blankulo plu hakas, segas, hakas, segas.
Al la triafoje metita demando, la najbaro respondas: - Severegan vintron ni ja havos.
Tiam demandas la unua: - Sed per kiuj signoj vi povas antaŭdiri, kia estos la vintro?
- Ho, simple, laŭ tiom da ligno stakigita ĉe via domo!

La comune opinione pubblica si dilata a dismisura grazie all'abitudine della gente di andare a dormire lasciando il cervello nell'armadio e dimenticando di riprenderlo il mattino seguente ... con l'inevitabile conseguenza di dover usare quello degli altri.

La ordinara publika opinio plilarĝiĝas danke al la kutimo de la homoj enlitiĝi lasante la cerbon en la ŝranko kaj forgesante la morgaŭan metenon repreni ĝin … kun la ne evitebla sekvo esti devigataj uzi tiun de aliaj. □ *(trad. RoBo)*

L a t i n a ĵ o j

Quod nullum est, nullum producit effectum
ciò che è nullo, non produce alcun effetto. Nevalidaĵo ne naskas efikon.

Quod scripsi scripsi!
ciò che ho scritto ho scritto! Kion mi skribis, tion mi skribis!

Quorum
plurale del pronome *qui* (“dei quali”), è il numero necessario di voti per la conquista di un seggio o di persone per la validità di un’assemblea. *Kvorumo.* Minimuma voĉkvanto por validaj balotoj.

Quot homines, tot sententiae
quante teste, tanti pareri. Kiom da homoj, tiom da opinioj.

Raptus
in latino significa “rapimento” (da *rapere).* Indica l’impulso irrefrenabile a compiere un’azione, per lo più violenta, ma anche il turbine dell’ispirazione poetica. *Rabado.* Perforta nehaltigebla impulso.

Rebus
dalle cose. Ricavare qualcosa dall’osservazione delle cose. Gioco enigmistico, ma anche un rompicapo irrisolvibile. *Pri aferoj.* Eltiri ion de observado de la aferoj. Enigma ludo, sed ankaŭ ne solvebla cerbumaĵo.

Rebus sic stantibus
stando così le cose. *Se la afero estas tiel.* Rezignacia konstato.

Recto stat fabula talo
la menzogna si appoggia sul piede buono. Mensogo apogiĝas sur la plej forta piedo.

Referendum
Istituto giuridico con cui il popolo è chiamato a pronunciarsi su questioni di interesse generale. Il termine, gerundio di *refero,* sottintende *convocatio ad kunvokado*. *Alvoko.* Balotoj pri ĝeneralaj aferoj.

Relata refero
riferisco quanto mi è stato detto. Riferisco senza interpretazioni né responsabilità personali. *Mi raportas, kion oni diris al mi.* Mi raportas sen personaj interpretoj kaj personaj respondecoj.

Risus abundat in orae stultorum
il riso abbonda sulla bocca degli stolti. Ridado troas ĉe stultula buŝo.

Salve
è la 2a persona singolare dell’imperativo di *salvere,* “star bene”, che oggi si usa come saluto. *Estu sana.* Bondezira saluto.

Sarmatorum virtus velati extra ipsos
in ogni caso, le virtù dei Sarmati sono affettate. Ĉiukaze la virtoj de la Sarmatoj estas afektaj.

Scripta manent, verba volant
lo scritto rimane, e le parole volano, è usato per indicare che le cose orali vengono dimenticate, mentre quelle scritte permangono. *Sribaĵo restas, parolo flugas.* Prefere fiksi promesojn per skriba formo.

Sedentem in tribunali
sedente in tribunale [quale giudice]. Sidanta kortume [kiel juĝisto].

Segnius irritant animos demissa per aures
più fiacca è l’eccitazione dei sensi per mezzo delle orecchie. Pli feblas sensekscito per oreloj.

Semel in anno licet insanire
una volta all'anno è lecito fare pazzie. Unufoje jare licas stultiĝi.

Sempre sibi consona
sempre conforme a se stessa. Ĉiam konforme al si mem.

Senior
"più vecchio" (comparativo di *senex),* indica la persona più anziana tra due della stessa famiglia aventi uguale nome o chi, nello sport, milita in una categoria superiore. *La plej maljuna.* Aldona indiko por distingi samnomuloj.

Sequere Deum
segui la divinità. Sekvu Dion.

Si vis pacem para bellum
se vuoi la pace prepara la guerra. Roma fin dall'inizio dovette lottare per difendersi dai nemici e i Romani si abituarono ad affidarsi alle armi piuttosto che alla diplomazia, la quale contro i "barbari" era spesso inutile. Dezirante pacon, preparu militon.

Sic transit gloria mundi
così passa la gloria del mondo. Si usa nell'elezione del papa come invito e ammonimento contro la superbia per il nuovo incarico. *Tiel pasas la gloro de la mondo.* Uziĝas post la elekto de nova papo, kiel invito kaj admono kontraŭ la orgojlo.

Sine die
significa "senza giorno (stabilito), senza scadenza, a tempo indeterminato". *Sen tago.* Mankas preciza tempopunkto, limtempo.

Sollicitam explicuere frontem
spianarono la fronte preoccupata. Ili glatigis la afliktitan frunton.

Sine effusione sanguinis non fit remissio
senza versare sangue non c'è remissione. Non ti regala niente nessuno. *Sen sangelfluo ne estas pardono.* Neniu donacas ion al vi senkompense.

Solus Gallus cantat
solo il gallo canta. Nur la koko kokorikas.

Somnio an vigilio?
sogno o son desto? Ĉu mi sonĝas aŭ mi estas veka?

Spes et fortuna valete
addio speranze e fortuna. Adiaŭ esperojn kaj bonŝancon.

Spes ultima dea
la speranza è l'ultima dea. *Espero estas la lasta diino*. Ŝi nur laste forlasas nin.

Splendidae mendax
splendidamente falso, viene riferito a una cosa indubbiamente falsa. *Mirinde falsa*. Evidenta sed bele prezentita falsaĵo.

Spreta exolescunt
le cose che si disprezzano finiscono dimenticate. La neglektataj aferoj forgesiĝas.

Status quo (ante)
nello stato in cui le cose sono (*o erano prima*), è la situazione che sussiste in un dato momento, attuale o precedente. Tiel kiel la afero estas(-is). □

Reage al la pasinta "ITALA FERVOJISTO - Informa Bulteno", alvenis signoj, gratuloj:

- La Redakcio varme dankas al la multaj legantoj, kiuj interesiĝis kaj esprimis aprecon pri nia Bultenon.
Tiuj vortoj estas tre kuraĝigaj kaj subtenigaj. Sugestoj kaj kontribuaĵoj per artikoloj, konsiloj kaj rimedoj estos ĉiam kore bonvenaj. □

H u m u r a ĵ o j

Nella giungla

Un insegnante cannibale sta istruendo i suoi allievi su come avere un buon pasto, quando dal cielo un rumore li distrae.
- Che cos'è che vola sopra di noi? Chiede un ragazzino.
- È una scatoletta. Se per caso ne trovate una in terra mangiate solo l'interno, per non rompervi i denti.

En ĝangalo

Kanibal-instruisto klarigas al etaj lernantoj kiel havigi al si bonan manĝaĵon, kiam el la ĉielo bruo distras ilin.
- Kio estas tio, kiu flugas super ni? - demandas knabeto.
- Ĝi estas skatoleto. Kiam vi hazarde trovos unu el ili sur la tero manĝu nur ĝian enhavon, por ne rompi al vi dentojn.

Carabinieri.

Un carabiniere torna a casa infuriato e ordina alla moglie: - Tira su la gonna e giù le mutande!
Lei, intimidita, ubbidisce.
Lui guarda e fa: - Meno male… Mi avevano detto che l'avevi data via!

Karabenistoj

Karabenisto kolera revenas hejmen kaj ordonas sian edzinon: levu la jupon kaj mallevu la kalzoneton!
Ŝi, timigita, obeas.
Li rigardas kaj diras: - Feliĉe… Oni diris al mi, ke vi fordonis ĝin!

Carabinieri.

Un carabiniere sta facendo una crociera su una nave, quando questa urta uno scoglio e incomincia a inabissarsi.
È disperato, ma per fortuna un marinaio lo incoraggia e gli dice: - Vieni con me e fai come faccio io.
Il marinaio prende un'ascia e con pochi colpi decisi recide le funi di una scialuppa di salvataggio.
Allora anche il carabiniere prende un'ascia e comincia a dare dei gran colpi sulla barca facendola a pezzi.
Il marinaio, inorridito, gli chiede: - Sei matto? Ma che fai?
E lui risponde: - Ti aiuto a fare la zattera!

Karabenistoj

Karabenisto krozadas, kiam la ŝipo kolizias kontraŭ rifon kaj komencas subakviĝi.
Li teruriĝas, sed bonŝance maristo kuraĝigas lin kaj diras: - Sekvu min kaj faru same kiel mi faras.
La maristo per hakilo ektranĉas la ŝnurojn de savboato.
Tiam la karabenisto prenas hakilon kaj ekfrakas la boaton.
La maristo, hororige, demandas lin: - Ĉu vi freneziĝas? Kion vi faras?
Kaj li respondas: - Mi helpas vin konstrui savofloson!

L'ispezione

Un ispettore scolastico entra in classe per un controllo e interroga un alunno: - Quanto fa sei per nove?
- Ma come? Lei è riuscito a diventare ispettore scolastico senza sapere quanto fa sei per nove?

La inspektado

Lerneja inspektoro eniras klasĉambron por kontrolo kaj pridemandas lernanton:
- Kiom faras sesoble naŭ?
- Kiel? Ĉu vi sukcesis iĝi lerneja inspektoro sen scio pri kiom faras sesoble naŭ?

Aritmetica

La bambina: - Papà, sono in difficoltà col compito di aritmetica.

Puoi aiutarmi a fare la somma?
Il padre: - Certamente no! Non sarebbe giusto.
E lei: - Fa niente, papà! Tu prova ugualmente ...

Aritmetiko

La knabino: - Paĉjo, mi havas malfacilaĵojn je aritmetika tasko. Ĉu vi povas helpi min sumi?
La Patro: - Certe ne! Tio ne estus ĝuste.
Kaj ŝi: - Ne gravas, paĉjo! Provu same …

Arance

Il padre: - Pierino, se io ti dò 2 arance, e poi te ne dò altre 3, quanto fanno in tutto?
- Non lo so, papà ...
- Come! non sai fare un calcolo così semplice?
- No, papà: a scuola contiamo sempre con le mele.

Oranĝoj

La patro: - Peĉjo, se mi donas al vi 2 oranĝojn kaj poste aliajn 3, kiom ili estas entute?
Peĉjo: - Mi ne scias …
- Kiel! Ĉu vi ne kapablas fari tiel simplan kalkulon?
- Ne, paĉjo: en la lernejo ni ĉiam kalkulas per pomoj.

Esempi illustri

Il padre al figlio pigro: - Quando Abramo Lincoln aveva la tua età si alzava tutte le mattine alle cinque per andare a scuola a studiare!
Il figlio: - Sì, ma quando aveva la tua, era già presidente degli Stati Uniti!

Famaj ekzemploj

La patro al la pigra filo: - Kiam Abraham Lincoln estis aĝa kiel vi, li leviĝis ĉiumatene je la kvina horo por iri studi al la lernejo!
La filo: - Jes, ja, sed je via aĝo, li jam estis prezidento de Usono!

La camicia da notte

Il sig. Rossi vuole comprare un regalo per la moglie che compie 78 anni. Egli esita un poco poi decide per una bella camicia da notte.
La moglie apprezza molto il regalo e pensa di fare qualcosa di simpatico per il marito; si mette a letto nuda, sperando che egli lo apprezzi.
Rossi contento si mette a letto quasi subito e dopo in po’ allunga delicatamente la mano sulla pancia della moglie. Ritira subito la mano e dice: - Al diavolo, al prezzo che ho pagato la camicia avrebbero almeno potuto stirarla!

Noktoĉemizo

S-ro Rossi volas aĉeti donacon por sia edzino, kiu festas siajn 78 jarojn. Li hezitas iomete finfine decidas pri bela noktoĉemizo.
La edzino ege ŝatas la donacon kaj pensas fari ion tre simpatian por sia edzo; ŝi metas sin en la liton tute nuda, kun la e-


Rapidu helpi min! Ne atendu, ke Arkimedo malkovru la levilon...!

spero, ke li aprecu tion.
S-ro Rossi preskaŭ tuj gaje enlitiĝas; atendas iom da tempo kaj delikate metas manon sur la ventron de la edzino. Li tuj retiras la manon kaj diras: - Diable, laŭ la prezo, kiun mi pagis la ĉemizon, oni povintus almenaŭ gladi ĝin!

Il malato

Tra amiche: - Mi sembri molto stanca e pallida. Che cos'è successo?
- Sì, da quando mio marito si è ammalato devo vegliarlo giorno e notte ...
- Ma, non hai assunto un'infermiera?
- Proprio per questo!

Malsanulo

Inter amikinoj: - Nu, vi aspektas tre laca kaj pala. Kio okazis al vi?
- Jes, de kiam mia edzo malsaniĝis mi devas atenti pri li tage kaj nokte ...
- Sed, ĉu vi ne dungis flegistinon?
- Jes; ĝuste pro tio.

Lui e Lei

Mattino presto: qualcuno bussa con forza alla porta di un casa di campagna. Si affaccia la padrona di casa con in braccio un neonato e dice: - Non fate tanto rumore. Mio marito sta ancora dormendo. Ieri sera ci è nato un figlio.

Li kaj ŝi

Matene tre frue: iu vigle batas ĉe la pordo de kampara domo. Post momento aperas la dommastrino kun suĉinfano enbrake, kiu diras: - Ne faru tiom da bruo. Mia edzo ankoraŭ dormas. Hieraŭ vespere ni ricevis novnaskiton.

Ultima confessione

Un marito vecchio si sente prossimo alla morte e si rivolge alla moglie molto più giovane e vivace di lui: - Siccome presto io morirò … dimmi sinceramente se i miei figli sono veramente miei …
E la moglie esitando: - Ma … se poi succede che tu non muori … ?

Lasta konfeso

Maljuna edzo sentas sin mortonta kaj turniĝas al sia multe pli juna kaj vigla edzino: - Nu, mi baldaŭ mortos ... bonvolu diri al mi sincere, ĉu miaj filoj vere estas miaj ...
Kaj ezite la edzino: - Sed ... se okazos, ke vi ne mortas …?

Consigli

Annuncio su un giornale: "Giovanotto presto sposo cerca contatto con signore esperto perché lo convinca a non farlo".

Konsiloj


Anonco en gazeto: "Edzigonta junulo serĉas kontakton kun sperta sinjoro, kiu konvinku lin ne fari tion."

Orecchio

Un apprendista mobiliere, usando male una macchina, perde un orecchio.
Viene portato d'urgenza all'ospedale, dove dicono al suo accompagnatore che se ritrovano l'orecchio reciso il chirurgo glielo potrà riattaccare al suo posto.
Veloce corsa e ritorno con l'orecchio.
Il ferito lo guarda e dice: - Quell'orecchio non è mio. Sul mio c'era una grossa matita per fare segni sul legno.

Orelo

Juna meti-lernanto ĉe meblofarejo, malbone utiligante la aparaton, perdas unu orelon.
Li estas urĝe portata al la hospitalo, kie oni diras al la akompananto, ke se oni retrovus la detranĉitan orelon, tiun la ĥirurgoj certe sukcesus remeti ĝustaloken.
Rapida kuro kaj reveno kun la orelo.
La vundito rigardas ĝin, kaj diras: - Tiu orelo ne estas mia.
Sur la mia estis dika krajono por fari signojn sur la ligno.



Operazione

Dopo una grave operazione il malato si risveglia. Un viso si china su di lui.
- Caro signor dottore, come è andata l'operazione?
- L'operazione non è riuscita bene, e io non sono il dottore, ma San Pietro!

Operacio

Post grava operacio vekiĝadas la malsanulo. Vizago kliniĝas super lin.
- Kara sinjoro doktoro, kiel sukcesis la operacio?
- La operacio ne sukcesis brile, kaj mi ne estas via kuracisto, sed Sankta Petro!

Differenza

Un farmacista scozzese per errore ha venduto stricnina invece di aspirina.
Egli telefona subito al cliente: - Mi scusi, le ho dato stricnina al posto della aspirina.
- C'è differenza?
- Sì, cinque euro e mezzo.

Diferenco

Skota apotekisto, erare vendas strikninon anstataŭ aspirinon.
Li tuj telefonas al la kliento: - Pardonu, mi donis al vi strikninon anstataŭ aspirinon.
- Ĉu estas diferenco?
- Jes, kvin eŭroj kaj duono.

Sordità

- Dottore, io penso che mia moglie cominci a diventare sorda.
- Devo saperne di più. Provi a parlarle discosto sei metri; se lei non risponde riprovi da quattro metri, poi da due metri, e se ancora non risponde, le parli d'appresso.
Egli ritorna a casa e già dall'ingresso chiede alla moglie: - Cosa c'è stasera per cena?
Nessuna risposta. Perciò rifà la domanda da quattro metri e dopo da due metri, ma non sente nessuna risposta.
Infine si avvicina a lei e chiede di nuovo: - Cosa c'è stasera per cena?
- Minestra di fagioli! Ti ho già risposto ben quattro volte.

Surdeco

- Doktoro, mi opinias, ke mia edzino komencas iĝi surda.
- Mi devas scii pli multe. Provu paroli al ŝi ses metrojn malproksime; se ŝi ne respondas reprovu je kvar metroj, poste je du metroj, kaj, se ankoraŭ ŝi ne respondas, parolu tute proksime al ŝi.
Li revenas hejme kaj jam el la enirejo li demandas la edzinon: - Kio estas ĉi vespere por mangi?
Neniu respondo alvenas. Pro tio li refaras la demandon je kvar metroj kaj poste je du metroj, sed li aŭdas nenian respondon.
Fine li alproksimiĝas al ŝi kaj demandas denove: - Kio estas ĉi vespere por manĝi?
- Fazeolan supon! Jam eĉ kvar fojojn mi respondis al vi. □

Pruvèrbi bulgnî§
Proverboj bolonjaj

Febrèr (Fibrarén) cûrt cûrt, mo catîv cme un tûrc.
Februareto tre mallonga, sed malbona kiel turko.

Febrèr fà al pånt, März a le råmp.
Februaro faras glacian ponton, Marto ĝin rompas.

Febrèr febrarâz, tén quêrt al mustâz.
Februaro, Februaraĉo, plukovru via vizaĝon.

Fèr äl nòz con däl lumèg.
Festi nupton per helikoj.

Fèr da vadder un curtèl, scansa ògni mèl.
Montrante tranĉilon, oni evitas malbonaĵojn.

Fèr e dsfèr l é tótt lavurèr.
Fari kaj malfari ĉiam estas laboro.

Fèr l amåur al bûr, durmîr al såul, magnèr da par sé: trai cretinè.
Amori en mallumo, dormi sub la suno, manĝi sole: jen tri stultaĵoj.

Fèr l amåur fòra ed staśån l é pròpi un quèl da bazurlån.
Amori ekster taŭga tempo estas stulta faro.

Fèr un fât e dû sarvézzi.
Fari unu aferon kaj du servojn.

Fòra mèrz, arîva avréll!
For de Marto, alvenas Aprilo!

Fòra mèrz, ch’a sän d avréll!
For de Marto, ĉar jam aprilas!

Fra l òs e i dént dal can, brîśa fichèr la man.
Inter osto kaj hundodentoj, ne enŝovu manon. □

Proverbi regionali
Proverboj regionaj

Chi non dà retta al padre e alla madre fa una brutta fine.
Kiu ne obeas la gepatrojn, tiu trafos malbonan finon. Abruzio

Chi non ha ago, non mangia lumaca.
Kiu ne havas pinglon, tiu ne manĝos helikon. Sardinio

Chi non ha buona memoria deve avere buone gambe.
Kiu ne havas bonan memoron, tiu havu bonajn krurojn. Abruzio

Chi non ha occhi spesso crede che tutti lo guardino. Chi ha occhi, spesso crede che nessuno lo vede.
Kiu ne havas okulojn, tiu opinias ke ĉiuj rigardas lin. Kiu havas okulojn, tiu ofte pensas ke neniu vidas lin. Kampanio

Chi non piscia in compagnia, o è un ladro o è una spia.
Kiu ne pisas kune, tiu estas aŭ ŝtelisto aŭ spiono. Latio

Chi non risica, non rosica.
Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. Venetio

Chi non rispetta il creatore non può rispettare la creatura.
Kiu ne respektas la kreinton, tiu ne povas respekti la kreaĵon. Kampanio

A nave rotta ogni vento è contrario.
Al difektita ŝipo ĉiuj ventoj kontraŭas. Toskanio

Il mondo è come il mare: vi affoga chi non sa nuotare.
La mondo estas kiel la maro: dronas kiu ne kapablas naĝi. Toskanio

Chi non se li gioca li spende male.
Kiu ne eluzas siajn ecojn, tiu ilin disĵetas.
Emilio □

Aforismi sulle lingue
Aforismoj pri lingvoj

Ben lungi dal rifiutare l'Esperanto … da molto tempo ne ho auspicato l'adozione.
Tre malproksima refuzi Esperanton ... jam de longe mi deziris ĝian alprenon.
Mario Andrew Pei

A volte la gente si combatte perché non si capisce, a volte perché si capisce fin troppo bene.
Iafoje la homoj interbatalas ĉar ne komprenigâs, alifoje ĉar ili kompreniĝas eĉ tro multe. Albert Joseph Guerard

L'utopia sta all'orizzonte. Mi avvicino di due passi, lei si allontana di due passi. Faccio dieci passi e l'orizzonte si allontana di dieci passi.
Per quanto cammini, non la raggiungerò mai. A cosa serve l'utopia? A questo: serve a camminare.
Utopio estas ĉe horizonto. Mi alproksimiĝas al ĝi du paŝojn, ĝi foriĝas du paŝojn. Mi piediras dek paŝojn kaj la horizonto moviĝas dek paŝojn pli for.
Eĉ se mi multe paŝus, mi ne atingus ĝin. Por kio utilas utopio? Por tio: ĝi utilas por paŝadi. Eduardo Hughes Galeano

Potrà esser chiamata (la lingua universale) mercurio universale di tutta la terra. Le altre lingue finora appartenevano a nazioni e stati, questa sarà per tutta la terra.
Quelle venivano chiamate col nome delle città e dei popoli: questa bisognerà chiamarla la lingua del mondo, la lingua dell'uomo.
Ĝi povos nomiĝi (la lingvo universala) merkuro universala de la tuta tero. La aliaj lingvoj ĝis nun apartenis al nacioj kaj al ŝtatoj, tiu ĉi estos por la tuta tero.
Tiuj estis nomitaj laŭ urboj kaj popoloj: tiu ĉi oni devos nomi monda lingvo, la homa lingvo.
Comenius, Iohannes Amos

Il mondo, giunto al suo presente grado di sviluppo materiale, di intenso scambio di prodotti e di idee, di comunicazioni sempre più rapide e facili, ha bisogno di una lingua internazionale più di qualsiasi altra cosa (ad eccezione di una sincera volontà di pace).
La mondo, kiu atingis la nunan evoluan materian nivelon, intensan interŝanĝadon de produktoj kaj ideoj, komunikadojn ĉiam pli rapidajn kaj facilajn, bezonas internacian lingvon pli ol iu ajn alia afero (escepte de sincera pacvolo).
Mario Andrew Pei

In tutte le lingue del mondo ciò che si impara per ultimo è lo spirito, e spesso sono i modi del gergo che rendono i detti più divertenti.
En ĉiuj lingvoj de la mondo, kion oni lernas laste estas ilia spirito, kaj ofte estas la ĵargonaj manieroj, kiuj igas la dirojn pli amuzaj. Giacomo Casanova

L'alfabeto appartiene a tutti e chiunque è padrone di servirsene per creare una parola e farsene il proprio nome.
La alfabeto apartenas al ĉiuj kaj ĉiu ajn estas libera utiligi ĝin por krei vorton kaj fari el ĝi sian nomon.
Giacomo Casanova

L'italiano sembra preso d'assalto dalle parole straniere… al punto che vien da chiedersi se la nostra lingua, come tante altre minori, sia a rischio di estinzione.
La itala lingvo ŝajnas sieĝata de fremdaj vortoj… tiel ke oni sin demandas se nia lingvo, same kiel multaj aliaj minoritataj, riskas estingiĝo.
Raffaele Simone □

GIOCO DI PAROLE = *VORTLUDO* - 34

Chiave = Sloŝilo (7, 8): La Homaranisma iniciatinto

O	L	I	L	U	L	D	J	O	T	E	G	U	M
N	O	E	Ĝ	O	I	C	U	R	P	Ŝ	P	O	E
O	I	O	R	U	N	O	N	I	Z	U	K	T	G
Z	R	A	J	R	J	J	A	I	P	N	I	K	A
O	T	A	L	A	P	T	O	O	L	I	S	O	F
O	E	M	U	L	N	O	A	U	O	V	E	N	O
K	M	A	E	O	E	R	D	N	L	E	R	R	N
I	O	J	C	J	J	O	E	M	A	R	A	O	O
T	N	I	Z	A	O	L	N	C	N	S	K	I	A
S	O	R	O	N	E	T	O	O	U	O	M	K	D
U	G	E	O	M	E	T	R	O	B	L	E	A	I
K	I	I	N	O	T	O	G	N	I	D	E	R	C
A	R	T	I	K	A	E	I	H	R	L	I	K	U
T	T	I	Ĝ	I	T	F	O	O	T	G	I	F	L

Cerca e riquadra con la matita ogni parola nella lista, in orizzontale, verticale, diagonale, in tutte le direzioni. Alcune lettere sono comuni a più parole. Quelle restanti, lette in ordine, formano la chiave definita.

Serĉu kaj ĉirkaŭlimigu per krajono ĉiujn vortojn enlistigitajn horizontale, vertikale, diagonale, al ĉiuj direktoj. Iuj literoj estas komunaj en kelkaj vortoj. La restintaj, legataj laŭorde, formas la difinitan ŝlosilon.

AKUSTIKO, ARAMEOJ, ARTIKA, EĜO, FOSILO, GEOMETRO, GIRI, ILIO, JAMA, JUĜI, KARESI, KRAKI, LEONO, LUCERNAJ, LUCIDA, LUDO, LULILO, MEGAFONO, MELENO, MOKI, MUGETOJ, NOCIO, NOKTO, OFTIĜI, ORGIO, OZONO, PALATO, PIAJ, PLEJ, REDINGOTO, SANA, ŜPRUCI, TARO, TEGO, TENORO, TRIBUNALO, TRIGONOMETRIO, TRIONO, ULNO, UNIVERSO, UPUPO, URALOJ, UZINON

Soluzione dell'ultimo numero, 33° gioco - *Solvo de la lasta numero, 33-a, vortludo*:
PER PACIENCO VENAS SCIENCO

Kolofon

ITALA FERVOJISTO
IL FERROVIERE ITALIANO

Informa Bulteno *de la Itala Fervojista Esperanto Asocio (IFEA), landa asocio de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio). Dulingva redakto (itale-esperante).*

Bollettino di informazione dell'Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti (IFEA), membro della Federazione Internazionale Ferrovieri Esperantisti (IFEF). Redazione bilingue (italiano e Esperanto).

Adresoj/Redaktejo:

- ***Romano Bolognesi***:
✉ Via Misa 4, IT-40139 Bologna
☎ ++39 051 547247.
💻 <bolognesiromano@alice.it>

- ***Vito Tornillo***:
✉ Via Salvo D'Acquisto 9/5, IT-40050 Monte S. Pietro BO,
💻 <vitorni@virgilio.it>.

Lingva kontrolado: Gianfranco Tomba
Lanfranco Bonora
Senpage al la membroj / Gratis ai membri
Memprintita / Stampato in proprio
Kvarmonata - neregula / Quadrimestrale - non regolare.

I.F.E.A.: H.Prezidanto/Redaktoro: Romano Bolognesi - Sekretario: Vito Tornillo - Kasisto: Gianfranco Tomba - Kunredaktoro/Komitatano/Fakkomisionano: Vito Tornillo - Revizoroj: Renzo Battistella, Lanfranco Bonora, Serio Boschin - Arbitraciantoj: Gino Corso, Emanuele Franchi, Elisa Gualandi.

I.F.E.A.-BankKonto ĉe: Vito Tornillo c/o CARISBO Zola Predosa (BO)
IBAN IT55 P063 8537 1301 0000 0004 536
uea-konto: robo-r
Apermonatoj: apr., aŭg., dec. (laŭeble)
Redaktofinoj: 20/03, 20/07, 20/11.
www.dlfbo/esperanto.it - www.ifef.net

Leggere l'Esperanto

L'Esperanto è una lingua molto precisa, armoniosa e chiara, con un sistema fonetico semplice ed esatto.

Ecco qui ***tutte*** le poche regole al riguardo.

☆ Le vocali sono cinque: **a e i o u**

☆ In tutto l' **alfabeto** è formato da 28 lettere:

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z

☆ **L'Esperanto si pronuncia come si scrive** e **si scrive come si pronuncia** (sempre, in ogni situazione).

☆ **Ogni lettera ha un suono, ad ogni suono corrisponde una lettera** (un singolo suono per ogni segno grafico).

☆ **Le lettere si pronunciano come in italiano** (quasi tutte, tranne le poche degli esempi, facili e conosciute).

☆ **L'accento tonico cade sulla penultima vocale** (sempre, negli esempi è quella sottolineata).

c	**sorda, come la *z* di *palazzo* (palaco)**
ĉ	**palatale, come la *c* di *felice* (feliĉa)**
g	**gutturale, come *gh* di *ghisa* (giso) o *g* di *gas* (gaso)**
ĝ	**palatale, come la *g* di *villaggio* (vilaĝo)**
h	**aspirata leggera (herbo); (pronunciarla sempre!)**
ĥ	**aspirata forte (ĥolero), come *ch* nel tedesco (*bach*)**
ĵ	**sibilante, come *sg* di *disgelo*; meglio la *j* francese (*jour*)**
k	**gutturale, come *ch* di *chilo* (kilo) o *c* di *cassa* (kaso)**
s	**sorda, come la *s* di *sale* (salo)**
ŝ	**sibilante, come il gruppo *sc* di *sceriffo* (ŝerifo)**
z	**sonora, come la *s* di *musica* (muziko)**
j - ŭ	**sono considerate consonanti e suonano come *i* e *u* brevi nelle parole italiane *gaio* (gaja) e *feudo* (feŭdo)**

Ni semas kaj semas, konstante



La reloj kunligas la landojn, Esperanto la popolojn.
Le rotaie collegano i territori, l'Esperanto i popoli.